

### Veranstaltungshinweise

Unsere **Esperantokurse** für: a) Anfänger mit Vorkenntnissen: Do. 19:00-20:30 Uhr, Gemeindehaus der kath. Kirchengemeinde St. Willehad, St.-Willehad-Str. 37, 26954 Nordenham; b) Fortgeschrittene: Do. 19:45-21:15 Uhr, Ev.-luth. Kirchengemeinde Brake, Kirchenstr. 24, 26919 Brake. – Wir präsentieren unseren Verein auch beim diesjährigen Festumzug des **Rodenkircher Marktes** am **22.09.2007**. Nächstes **Vereinstreffen**: am **24.10.2007** um 19:30 Uhr (*Panorama*, Elsfleth). Aktuelles u. Einzelheiten können unserer Netzseite <http://www.esperanto.de/unterweser/aranghoj.htm> entnommen o. bei Anne Höpken, Tel.: 04731-4837, erfragt werden. Gäste sind willkommen. Außerdem:

23.09.2007	4-a Rata Rendevuo, Hessisch Oldendorf
05.-07.10.2007	Esperanto-Sprachkurse (drei Niveaus), ICH <sup>1)</sup>
08.-12.10.2007	Esperanto-Sprachkurse (drei Niveaus; m. Ausflügen), ICH <sup>1)</sup>
13.10.2007	EMAS <sup>2)</sup> -Kulturtag, Oldenburg
19.-21.10.2007	100-jähriges Jubiläum der Esperanto-Vereinigung Münster, Nordwalde (int. Wochenende mit Esperanto Nederland)
31.10.-04.11.2007	Postsomera Klačkunveno, Halen (Zelem), Belgien
02.-04.11.2007	Sitzung des Rates der Esp.-Landesverbände, Herzberg
30.11.-02.12.2007	Esperanto-Sprachkurse (drei Niveaus), ICH <sup>1)</sup>
03.-07.12.2007	Esperanto-Sprachkurse (drei Niveaus; m. Ausflügen), ICH <sup>1)</sup>
21.-28.03.2008	24. Printempa Semajno Internacia, Waldfishbach-Burgalben
09.-12.05.2008	85. Deutscher Esperanto-Kongress, Essen
15.-18.05.2008	Printempa BARo 2008, Bad Münde
19.-26.07.2008	93. Esperanto-Weltkongress, Rotterdam, Niederlande

<sup>1)</sup>ICH: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, Tel.: 05521-5983

<sup>2)</sup>EMAS: Esperanto-Ligo de Malsupra Saksio (Landesverb. Niedersachsen im Dt. Esp.-Bund e. V.)

**Gojan kristnasko-feston kaj bonan gliton en la novan jaron!**  
**Ein frohes Weihnachtsfest und einen guten Rutsch ins neue Jahr!**

### Impressum:

*Zeitschrift:*

*Erscheinungsweise:*

*Herausgeber:*

*Information und Redaktion:*

*Bankverbindung*

*(für Beiträge und Spenden):*

Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)  
dreimal jährlich als Druckausgabe und  
elektronische Ausgabe, Netzseite:  
<http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>  
Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.  
(<http://www.esperanto.de/unterweser>)  
Anne Höpken, Magdalenenstr. 27,  
26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837  
Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368  
Andreas Kück, Tel.: 04702-5044  
Mario Müller, Tel.: 04732-1373

Raiffeisenbank Oldenburg eG  
BLZ 28060228  
Kontonummer 1200160000  
(Kassenwartin: Dörte Bierkämper)

**E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.**

# Esperanto Gazeto

N-ro 20

ISSN 1861-3330

Okt. 2007 – Jan. 2008

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



**Nordenham, 17.08.2007, Stadtfest:** Beim Umzug präsentierten wir unseren Verein und warben für Esperanto. Unsere zehnköpfige Fußgruppe zeigte erstmals unsere neue Flagge in der Öffentlichkeit.

**Nordenham, 17-a de Aŭgusto 2007, urbofesto:** Dum la procesio ni prezentis nian klubon kaj reklamis por Esperanto. Nia dekkapa marŝ-grupo unuafoje montris nian novan flagon en la publiko.

**Nia somerfesto – kun eblaĵo por flugo  
(Flugplatz Blexen, Nordenham, 14-a de Julio 2007)**

Veran allogaĵon estis elpensinta ĉi-foje nia festkomitato: flugojn en motor-glisaviadilo – kompreneble en la akompano de piloto. Luj el la ĉirkaŭ dudek ĉeestantoj profitis la okazon por ĝui rondirajn flugojn super Nordenham kaj Bremerhaven. Por la korpa bonfarto estis bongustaj salatoj, kiuj estis preparitaj de niaj klubanoj, kaj krome viando kaj kolbasoj de l' kradrostilo – Andreas

**Unser Sommerfest – mit Flugmöglichkeit  
(Flugplatz Blexen, Nordenham, 14.07.2007)**



Eine echte Attraktion hatte sich diesmal unser Festausschuss ausgedacht: Flüge im Motorsegler – selbstverständlich in der Begleitung eines Piloten. Manche der etwa zwanzig Anwesenden nutzten die Gelegenheit für Rundflüge über Nordenham und Bremerhaven. Für das leibliche Wohl gab es leckere Salate, die von unseren Vereinsangehörigen zubereitet worden waren, sowie Fleisch und Würste vom Grill. – Andreas

*Vor dem Start / Antaŭ la starto*

**7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio  
(Mariboro, 28-a de Julio ĝis 4-a de Aŭgusto 2007)**

Alke kaj Andreas el nia klubo kaj du Eŭrop-Uni-parlamentaninoj estis inter la 256 kongres-partoprenantoj el 29 landoj (27 Eŭropaj, Kanado kaj Togolando). La (cetere ne lingvorilatan) ĉeftemon “Akvo” enkondukis profesoro Endre Dudich (Hungarujo) per prelego. En ĝi li peris esencon, signifon kaj aperon de akvo kaj la de akvo efikatan utilon kaj kelkfoje kaŭzatan damaĝon. La konferenco “Interkultura dialogo kaj komunikado” estis alia grava parto de l' kongreso. Tial ĝin (evidente kiel unuan Esperanto-aranĝon) kunfinancis Eŭropa Komisiono. La unuopaj kongres-programeroj okazis diversloke. Tiel la kongresanoj ne nepre estis kuntenataj. Sed per tio ili ofte ĉeestis en la publiko de Mariboro kaj kun ili ĝuste ankaŭ Esperanto. En iuj restoracioj almenaŭ dum la kongreso estis ofertataj Esperanto-glaciaĵo kaj Esperanto-biero, kaj estis manĝokartoj en Esperanto. Eĉ granda Esperanto-torto estis bakita kaj distribuita al la kongresanoj okaze de la 120-jariĝo de tiu ĉi lingvo. En la kulturprogramo estis koncertoj kaj aliaj muzikprezentoj de interalie lokaj ĥoro kaj dueto, Georgo Handzlik, Jomo, Attila Schimmer, Solotronik kaj Dubravko Lapajne. Krome estis teatraĵo-prezentoj de Saša kaj Ana Pilipović, Henrri de Sabates kaj Zagreba Studenta Esperanto-Klubo. Per diversaj ekskursoj, ankaŭ en aliajn regionojn de Slovenujo, la kongresanoj ekhavis la eblaĵon konatiĝi pli kun tiu lando, kiu abundas pri pejzaĝa beleco. La venonta kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio okazos en Herzberg, la Esperanto-urbo. – Alke, Andreas

**Enigma**

	1	2	3	4	5	6
1						
2				7		
3						
4						
5						
6						

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la nomon de ĉefurbo de Eŭropa regno.

**Horizontale**

**1:** emocio de granda ŝato [sen finaĵo]; **2:** skribsigno por muziktono [sen finaĵo]; **3:** Sudeŭrop-lingven; **4:** tempo-punkto [sen finaĵo]; **5:** marŝendo; **6:** samdevenaj popoloj; **7:** maljese

**Vertikale**

**1:** doni animon, vivigi [sen finaĵo]; **2:** per aparato aŭ maŝino, kiu movas ion; **3:** virseksa organo de la floroj [sen finaĵo]; **4:** ene de lento [unuverte kaj sen finaĵo]; **5:** maljesendo; **6:** instigoj al malpermesita ago



„Nur Fischer oder Jäger waren der Marschen Volk vor tausend Jahren“ (“Nur fiŝkaptistoj aŭ ĉasistoj estis la popoloj de l' fekundaj malaltaĵoj antaŭ mil jaroj”), Allmers-Haus, Rechtenfleth

**Hoch lewe Osterstade!**

Et gift en Land,  
Dat is bekannt  
Woll up un dol an 'n Wesserstrand;  
An 'e eene Siet is Schlick un Reit,  
An 'e anner Siet is Moor un Heid;  
Dor binnen, dor wasst dat Gras so grön,  
Dor steit dat lewe Korn so schön,  
Dor weidt' de groten Ossen so fett,  
Dor wasst de Aschwarder Kohl so nett.  
Dit schöne Land  
Is us bekannt,  
Dat is us' lewe Heimatland:  
Von Buttell bet no Rade –  
Hoch lewe Osterstade!

Hermann Allmers

**Vivu Osterstade!**

Estas unu pejzaĝo,  
Bonkonata de homoj de chiu aĝo  
De supre ghis sube che la Vezerplagho;  
Che la bordo estas kano kaj ŝlimo,  
Estas erik' kaj march' che l' landa limo;  
Kreskas tiel verde la herb' de l' landa eno,  
Tie staras tiel bele la kara greno,  
Tie la grandaj bovoj tiel grase pashtighas,  
Tie la Ashvardena brasik' tiel multighas.  
Lando bela tiu chi  
Estas konata al ni,  
Nia hejmlando kara estas ghi:  
De Buttell ghis Rade –  
Vivu Osterstade!

El la malaltgermana esperantigis Andreas

## 92. Esperanto-Weltkongress (Yokohama, Japan, 04.-11.08.2007)

Unter den 1901 Kongressteilnehmern aus 57 Ländern waren auch unsere Vereinsmitglieder Mario und Hans Gerd. Mit ihm sprach Andreas.

A.: *Was beeindruckte dich am meisten bei deinem Aufenthalt in Japan?*

H.: Die andersartige Kultur; die Freundlichkeit der Einheimischen; das nächtliche sehr laute Zirpen der Grillen in den Parks; das Essen, z. B. musste man selbst dem aufgetischten heißen Essen das rohe Ei hinzufügen, damit auch dieses dann durch die Hitze fertig zubereitet wird.

A.: *Wie stellt sich Yokohama dar?*



Yokohama / Jokohamo

H.: Modern und lebhaft (auch nachts). Yokohama ist eine Hafenstadt, in der Angehörige verschiedener Nationen zusammenleben, z. B. Japaner, Chinesen und Koreaner. Es war lärmend, sonnig, windig und heiß, 31°C schon um neun Uhr morgens. Zufahren funktioniert gut: Am Abfahrtsort steckt man irgendeine Münze in den Automaten und bekommt eine Fahrkarte. Den eventuellen Rest bezahlt man erst am Zielort. In Schnellrestaurants bekommt man einen Piepser, der einen

benachrichtigt, sobald das Essen fertig ist.

A.: *Über welche Sehenswürdigkeiten kannst du berichten?*

H.: Das ca. 295 m hohe Gebäude „Landmark Tower“ in Yokohama ermöglicht eine herrliche Aussicht. Der Bahnhof des benachbarten Tokio beeindruckt: Eine fließende Menge Menschen, ohne dass jemand Schlange stehen muss. Sogar ein vor Ort telefonisch vereinbartes Treffen unseres Freundes Robert aus Australien mit einer Japanerin klappte dort, obwohl sie sich zuvor noch nicht gesehen hatten.

A.: *Wie waren die Kongressörtlichkeiten und die Kongressorganisation?*

H.: Die Kongressörtlichkeiten waren sehr gut. In jeder Etage konnte man Getränke bekommen. Allerdings fanden Veranstaltungen in verschiedenen Gebäuden statt. Und die fanden manche Kongressteilnehmer bisweilen nicht.

A.: *Wie verständigtest du dich mit den dortigen Nicht-Esperantisten?*

H.: Hauptsächlich mit der Gebärdensprache. Mit beispielsweise Englisch klappte die Kommunikation meistens nicht.

A.: *Inwieweit war das Ereignis in der Öffentlichkeit bekannt?*

H.: Soweit ich feststellen konnte, kaum. Plakate waren nur an den Gebäuden, in denen Kongressveranstaltungen stattfanden.

A.: *Welche Kongress-Programmpunkte gefielen dir vor allem?*

H.: Das Konzert der litauischen Musikgruppe Asorti; der nationale und internationale Abend (darin besonders die Darbietungen von Trommlern); das alternative Bankett der Jugendlichen; die Versteigerung und der Vortrag über die Kunst, öffentlich zu reden. – Hans Gerd, Andreas

## Jubileofesto okaze de la unujariĝo de Esperanto Noord-Nederland (Terhorne, 16-a de Junio 2007)

Okaze de la unujariĝo de la asocio Esperanto Noord-Nederland veturis Alke, Elfriede, Anne kaj Andreas peraŭte en la vilaĝon Terhorne. Ĝi situas en la Nederlanda provinco Frislando. Sur la ekskursboato "Redbad" (t. e. la nomo de fama frisa reĝo) ĉirkaŭ la 10:30 horo kolektiĝis proksimume kvindek personoj, la plej multaj el Nederlando, tri el Belgujo, unu el Svedujo, kvar el nia Esperanto-grupo kaj ses el tiu de Bremeno (inter ĉi lastaj du infanoj). Ni gratulis kaj transdonis donacon al la jubileuloj. La boato veturis sur lagoj kaj kanaloj en la direkto al la urbo Sneek. Dume la ekskursanoj ĝuis la belegan pejzaĝon, tra kiu veturis ankaŭ multaj velboatoj, kaj estis regalataj per kafo, bongusta speciala frisa kuko (el marcipano kun mandarinoj kaj kremaĵo), granda bufedo kun supo, proksimume dek diversaj pan- kaj bulkospecoj, fromaĝo, kolbaso, salatoj kaj viando. Tagmeze la boato haltis en la vilaĝo Langweer. Tie ni vizitis bazaron de brokantaĵoj, kiu okazis en du stratetoj inter malgrandaj, belaspektaj domoj. Pro la bazaro ili bedaŭrinde ne estis tute videblaj. Je sia granda surprizo Andreas malkovris en magazeno de antikvaj libroj la miniaturo-vortaron nederlanda-hispana el la serio Lilliput de Langenscheidt-eldonejo kaj aĉetis ĝin. (Tiajn vortarojn li kolektas ekde 1973; li nun havas belan memoraĵon pri tiu ĉi ekskurso.) Post pluveturo kaj halto en Sneek la ekskursanoj ekhavis posttagmeze duan landpromenon. Ni admiris la interesan fasadon de la urbodomo kaj iris en la preĝejon de Martini. Tie estis multaj aliaj homoj pro ekspozicio. En la boato dum la reveturo unu el la ekskursanoj ludis akordionon. Krome estis okazigita divenludo, kaj oni povis senkoste akiri malnovajn Esperanto-librojn. Reveninte en Terhorne, la ekskursanoj vespermanĝis en la restoracio Eetcafé 't Far. Je la 20:00 horo ni veturis hejmen. Ni dankas la organizantojn por tiu ĉi bonega tago. – Anne, Andreas



Bootsausflug / Boatekskurso

## Jubiläumsfeier anlässlich des einjährigen Bestehens von Esperanto Noord-Nederland (Terhorne, 16.06.2007)

Anlässlich des einjährigen Bestehens des Verbandes Esperanto Noord-Nederland fuhren Alke, Elfriede, Anne und Andreas mit dem Auto in das Dorf Terhorne. Es liegt in der niederländischen Provinz Friesland. Auf dem Ausflugsboot „Redbad“ (d. i. der Name eines berühmten friesischen Königs) fanden sich gegen 10:30 Uhr etwa fünfzig Leute ein, die meisten aus den Niederlanden, drei aus Belgien, einer aus Schweden, vier aus unserer Esperanto-Gruppe und sechs aus der von Bremen (unter Letzteren zwei Kinder). Wir gratulierten den Jubilaren und überreichten ihnen ein Geschenk. Das Boot fuhr auf Seen und Kanälen in Richtung auf die Stadt Sneek. Unterdessen genossen die Ausflügler die wunderschöne Landschaft, durch die auch viele



Segelboote fahren, und wurden bewirtet mit Kaffee, leckerem besonderen friesischen Kuchen (aus Marzipan mit Mandarinen und Cremespeise), großem Buffet mit Suppe, etwa zehn verschiedenen Brot- und Brötchensorten, Käse, Wurst, Salaten und Fleisch. Mittags machte das Boot halt in dem Dorf Langweer. Dort besuchten wir einen Flohmarkt, der in zwei Gassen zwischen kleinen, schmucken Häusern stattfand. Wegen des Marktes waren sie leider nicht vollständig sichtbar. Zu seiner großen Überraschung entdeckte Andreas in einem Laden antiquarischer Bücher das Miniatur-Wörterbuch Niederländisch-Spanisch aus der Serie Lilliput des Langenscheidt-Verlags und kaufte es. (Solche Wörterbücher sammelt er seit 1973; jetzt hat er ein hübsches Souvenir von diesem Ausflug.) Nach Weiterfahrt und Halt in Sneek bekamen die Ausflügler am Nachmittag einen zweiten Landgang. Wir bestaunten die interessante Fassade des Rathauses und gingen in die Martini-Kirche. Dort waren viele andere Leute wegen einer Ausstellung. Im Boot während der Rückfahrt spielte einer der Ausflügler Schifferklavier. Außerdem wurde ein Ratespiel veranstaltet, und man konnte alte Esperanto-Bücher umsonst erwerben. Nach Terhorne zurückgekehrt, aßen die Ausflügler im Restaurant Eetcafé 't Far zu Abend. Um 20:00 Uhr fuhren wir nach Hause. Wir danken den Organisatoren für diesen herrlichen Tag. – Anne, Andreas

### 7. Kongress der Europäischen Esperanto-Unio (Maribor, 28.07.-04.08.2007)

Alke und Andreas aus unserem Verein und zwei EU-Parlamentarierinnen waren unter den 256 Kongressteilnehmern aus 29 Ländern (27 europäischen, Kanada und Togo). Das (übrigens nicht sprachbezogene) Hauptthema „Wasser“ führte Professor Endre Dudich (Ungarn) mit einem Vortrag ein. Darin vermittelte er



See von Bled / Lago de Bled

Wesen, Bedeutung und Vorkommen von Wasser und den durch Wasser bewirkten Nutzen und manchmal verursachten Schaden. Die Konferenz „Interkultureller Dialog und Kommunikation“ war ein anderer wichtiger Teil des Kongresses. Daher mitfinanzierte ihn (offenbar als erste Esperanto-Veranstaltung) die Europäische Kommission. Die einzelnen Kongressveranstaltungen fanden an verschiedenen Orten statt. So wurden die Kongressteilnehmer nicht unbedingt zusammengehalten. Aber sie waren dadurch oft in der Öffentlichkeit von Maribor präsent und mit ihnen eben auch Esperanto. In manchen Restaurants wurden zumindest während des Kongresses Esperanto-Speiseeis und Esperanto-Bier angeboten, und es gab Speisekarten auf Esperanto. Sogar eine große Esperanto-Torte wurde gebacken und an die Kongressteilnehmer verteilt anlässlich des 120-jährigen Bestehens dieser Sprache. Im Kulturprogramm gab es Konzerte und andere Musikdarbietungen von u. a. einem örtlichen Chor und

Duett, Georgo Handzlik, Jomo, Attila Schimmer, Solotronik und Dubravko Lapajne. Außerdem gab es Theateraufführungen von Saša und Ana Pilipović, Henri de Sabates und dem Zagreber Studenten-Esperanto-Klub. Durch verschiedene Ausflüge, auch in andere Regionen Sloweniens, erhielten die Kongressteilnehmer die Möglichkeit, das Land näher kennen zu lernen, das reich ist an landschaftlicher Schönheit. Der nächste Kongress der Europäischen Esperanto-Unio wird in Herzberg, der Esperanto-Stadt, stattfinden. – Alke, Andreas

### 92-a Univesala Kongreso de Esperanto (Jokohamo, Japanujo, 4-a ĝis 11-a de Aŭgusto 2007)

Inter la 1901 kongresanoj el 57 landoj estis ankaŭ niaj klubanoj Mario kaj Hans Gerd. Kun li parolis Andreas.

A.: *Kio plej multe impresis vin dum via estado en Japanujo?*

H.: La alispeca kulturo; la ĝentileco de la tieuloj; la dumnokta tre laŭta ĉirpado de la griloj en la parkoj; la manĝaĵoj, ekz. oni mem devis aldoni al la surtabligita varmega manĝaĵo la krudan ovon, por ke tiam ankaŭ tiu ĉi estu finpreparata per la varmege.

A.: *Kiel sin prezentas Jokohamo?*

H.: Moderne kaj vigle (ankaŭ nokte). Jokohamo estas havenurbo, en kiu kunvivas anoj de diversaj nacioj, ekz. japanoj, ĉinoj kaj koreoj. Estis brue, sune, vente kaj varmege, 31°C jam je la naŭa horo matene. Trajnveturado funkcias bone: En la ekveturloko oni metas iun moneron en la aŭtomaton kaj ricevas bileton. La eventualan reston oni pagas nur en la celloko. En rapidrestoracioj oni ricevas pepilon, kiu sciigas onin, tuj kiam la manĝaĵo estas preta.

A.: *Pri kiuj vidindaĵoj vi povas raporti?*

H.: La ĉ. 295 m alta konstruaĵo "Landmark Tower" en Jokohamo ebligas belegan elrigardon. La stacidomo de la najbara Tokio impresas: Fluanta amaso da homoj sen tio, ke iu devas enviciĝi. Eĉ surloke per telefono konsentita rendevuo de nia amiko Robert el Aŭstralio kun japanino funkciis tie, kvankam ili ankoraŭ ne estis vidintaj unu la alian antaŭe.

A.: *Kiaj estis la kongresejoj kaj kongres-organizado?*

H.: La kongresejoj estis tre bonaj. En ĉiu etaĝo oni povis ekhavi trinkaĵojn. Tamen, aranĝoj okazis en diversaj konstruaĵoj. Kaj ĉi tiujn iafoje ne trovis iuj kongresanoj.

A.: *Kiel vi interkompreniĝis kun la tieaj ne-esperantistoj?*

H.: Ĉefe per la gestolingvo. Per ekzemple la angla la komunikado plej ofte ne funkciis.

A.: *Kiom la evento estis diskonigita en la publiko?*

H.: Kiom mi povis konstati, apenaŭ. Afiŝoj estis nur ĉe la konstruaĵoj, en kiuj okazis kongres-aranĝoj.

A.: *Kiuj kongres-programeroj plaĉis al vi antaŭ ĉio?*

H.: La koncerto de la litova muzikgrupo Asorti; la nacia kaj internaciaj vesperoj (en ili precipe la prezentoj de tamburistoj); la alternativa bankedo de la gejunuloj; la aŭkcio kaj la prelego pri la arto publike paroli. – Hans Gerd, Andreas